

VORTOJ SENTOJ KREDOJ

VORTOJ

Komence mi surpaperigis
Poste mi ĵetis fajren ilin
Flirtante flamigis la vortoj
Ve!
Miaj pensoj forbruletis
Ĉu eterne?

SENTOJ

Blankaj sentoj kaj nigraj sentoj
Grizajn musojn naskas la montoj
Kiel papilioj forflugis
Ve!
La ruĝaj kaj bluaj sentoj
Ĉu eterne?

KREDOJ

Kredoj kaj malkredoj ĝojigas
Dioj kaj Maldioj dolĉigas
Nenion vidi tamen kredi
Ve!
Nur la blinduloj kapablas
Ĉu eterne?

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el
diversaj landoj kaj per Esperanto
diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
☎ +(0)420 723 672 335;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume
€20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono:
pagante rekte al KELI €16,- • pagante al
Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj
per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto
(informiĝu ĉe UEA) bonvolu preferi pagi al UEA
por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de
'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':
CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Nygatan 10 A; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_board@yahoo.se

Kontrollegis: Éva FARKAS-TATÁR, Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ
egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la
kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke
oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ
traduko oni sendu al la redaktoro.*

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec₉

ENHAVO

Intervjuo	99
Erasmus kaj la ovo de la herezo	100
La Esperanto-Biblio 40-jara	103
La ofero en la Biblio	107
Historia evento en Lund	109
Li perdis ĉion – li gajnis ĉion	111
Jubileo kaj fino	115
Abundajn salutojn	116
Aliĝi-invito al kongreso 2017	117
Leen Hordijk 90-jara	119
Vi, Dia Kreinto	120

Redaktoraj vortoj

Ĉar mi loĝas proksime al Lund kaj
Ĉen Lund mi studis dum 5 jaroj, por
mi la historia evento, kiu okazis la 31an
de oktobro, estis grava. Sed mi opinias
ke ne nur por mi, certe por ni ĉiuj, tiu
okazaĵo estis, estas kaj estos grava.
Temas pri la inaŭguro de la reformacia
jaro, la kuna memorigo katolika-
luterana pri la 500a datreveno de la
reformacio. Eble eĉ pli grava, lige kun
tiu solena okazaĵo, estas la kune sub-
skribita deklaro pri estonta kunlaboro
inter la katolikoj kaj luteranoj. *De
konflikto al komuneco – kune en
espero!* La deklaro akcentas ke ni estas
unu en Kristo kaj kiel la branĉoj de la
vinarbo ne povas doni frukton de si
mem, same ni ne povas se ni ne restas
en Kristo (Joh 15,4).

Eble hazarde, sed verŝajne ne, tiu ĉi
numero enhavas multe da materialo pri
nia Biblio. Ĝi estis grava antaŭ 500
jaroj, ĝi estas grava por ni hodiaŭ.

Mi dankas ĉiujn kontribuantojn al la
nuna Dia Regno kaj mi esperas al vi
ĉiuj bonan legadon!

tradukis Pavel POLNICKÝ, CZ

“**E**niru” diris Dio. “Ĉu vi vere volus fari kun mi intervjuon?”

“Se Vi havas tempon,” diris mi. Dio ekridetis kaj respondis: “Mia tempo estas eterneco kaj pro tio ĝi sufiĉas por ĉio. Kaj kion vi volas demandi min?”

“Per kio plej multe surprizas Vin homoj?”

Dio respondis: “Tio, ke ili enuas esti infanoj kaj rapidas esti plenkreskaj, kaj tuj poste ili sopiras esti infanoj.

– Surprizas min, ke ili perdas sanon pene perlaborante monon, kaj poste elspezas multe da mono por ordigi sian sanon.

– Ŝokas min ilia timo de estonteco, ke ili tute forgesas nuntempecon, kaj tiel ili ne travivas nunan tempon kaj ne vivas por estonteco.

– Surprizas min, ke ili vivas tiel, kvazaŭ ili neniam mortos kaj poste mortas tiel, kvazaŭ ili neniam vivis.”

Dio prenis miajn manojn kaj ni momenton silentis. Poste mi demandis: “Kion Vi instruus viajn infanojn?”

Dio ridetis kaj respondis: “Mi volus, ke ili sciu, ke ne povas devigi iun ami ilin. Ili nur povas permesi, ke aliaj amu ilin.

– Mi volus, ke ili ekkonu, ke plej valora ne estas tio, kion ili en la vivo posedas, sed kiun ili havas.

– Mi volus, ke ili sciu, ke ne estas bone kompari sin kun aliaj. Ĉiu estos

juĝota unuope, ne en la grupo kun aliaj.

– Mi volus, ke ili sciu, ke tiu ne estas riĉa, kiu posedas multon, sed tiu, kiu bezonas malmulton.

– Mi volus, ke ili ekkonu, ke nur dum kelkaj sekundoj ni povas fari al tiuj, kiujn ni amas, profundajn vundojn, sed daŭras jarojn sanigi tiujn vundojn.

– Mi volus, ke ili eklernu pardoni, pardoni per agoj.

– Mi volus, ke ili sciu, ke ekzistas multaj homoj, kiuj tre amas ilin, sed ne kapablas tion esprimi.

– Mi volus, ke ili sciu, ke havante monon ili povas aĉeti ĉion, krom la feliĉo.

– Mi volus, ke ili rekonu, ke vera amiko estas tiu, kiu scias pri ili ĉion, sed tamen amas ilin.

– Mi volus, ke ili rekonu, ke ne ĉiam sufiĉas, se aliaj pardonas al ili, sed gravas mem pardoni.”

Momenton mi sidis ĝojante el Dia proksimeco. Poste mi dankis Dion, ke li trovis tempon por mi. Mi dankis por ĉio, kion Li faras por mi kaj mia familio.

Kaj Dio respondis: “Kiam ajn vi demandu kaj mi respondos al vi. Mi estas tie 24 horojn ĉiutage.”

Homoj forgesos, kion vi diris. Ili forgesos kion vi faris, sed ili neniam forgesos, kiel ili sentis sin apud vi.



Erasmus kaj la ovo de la herezo

El ĵurnalo Trouw de 28 aprilo 2016.

Tradukis Leen Hordijk, NL

Muzeo Gouda (NL) dediĉas ekspozicion al la Nederlanda pensulo Erasmo (1466-1536), kiu publikigis antaŭ kvin cent jaroj specialan Biblion. Erasmo esperis ke tiu verko purigus la vorton de Dio, sed liveris senintence kontribuon al la Reformacio.

Estas maltrankvile en la eklezio en la jaro 1516. La nederlanda pensulo Desiderius Erasmus (1466-1536) tradukis la Novan Testamenton el la Greka kaj tiu traduko rolas nun el la printilo. Ĉi tiu nova Biblio ne tuŝas per unu vorto pri konfesado de pekojn nek pri vendado de indulgencoj de pekoj. La eklezio koleriĝis. “Vi metis la ovon de herezo “ riproĉas ĝi pro tio la severe ortodoksan Erasmon.

Ĉi tiu Biblio nun kuŝas en Muzeo en Gouda (NL), kvin cent jarojn poste en la vitroŝranko ĉe la fenestro. La verkaĵo estas granda, mil paĝojn dika kaj al la randoj flavkolorite. Dikkarnaj anĝeletoj kaj ornamaĵoj enkadrigas la tekston sur la paĝoj. “La Novum Instrumentum estis la vivolaboro de Erasmo.” diras la muzeestro Gerardo de Kleijn, farante gestojn al la libro. “La verkaĵo kaŭzis multe da sensacio. Ankoraŭ oni daŭre asertas ke li pavimis la vojon por la Reformacio”.

Kiel tio okazis estas klare videbla en la nuna Erasmo-ekspozicio en Muzeo

Gouda. La ekspozicio okazas kaŭze de la kvin centjara ekzisto de la Biblio de Erasmo sed ampleksas la tutan vivon de la dekseca jarcenta humanisto, teologo kaj filosofo. Vizitantoj estas kondukataj per aŭdioilo laŭlonge de pentraĵoj,



Erasmus laŭ A. Dürer

verkaĵoj, posedaĵoj de Erasmo kaj filmoj.


“Erasmo trovis ke la bibliaj tekstoj estas grave malpurigitaj tra la jarcentoj” sonas la voĉo de Herman Pleij, profesoro de historia Nederlanda literaturo kaj gastkuratoro de la ekspozicio, ĉe la vitroŝranko. “La eklezio ja okupas sin pri ŝlimaj ŝvittukoj kaj aliaj relikvoj” Pleij citante Erasmon, “sed la bazon de nia kredo, la Biblio, oni nur malordigas.”

Malakurataj transkribaĵoj fare de la monaĥoj, malĝustaj interpretaĵoj kaj skrapitaj tekstopartoj – la malnova Latina bibliotraduko estas amasiĝo de neperfektaĵoj, laŭ Erasmo. Verva kritiko do, pri de la Papo benita teksto kiu jam mil jarojn funkciis kiel la oficiala traduko. “La eklezio trovis tre ŝoka ke Erasmo estis tiel multe okupita pri la tera kunteksto de la Biblio, kiu devenus rekte de Dio”, daŭrigas estro De Kleijn. “Kaj tiam li ankaŭ diris ke tio estis por

li la vivotasko por purigi la sanktan vorton”.

Erasmo decidis denove traduki la originalajn Grekajn fontojn de la Nova Testamento en la Latinan lingvon. Tio estis ankoraŭ sufiĉe granda laboro. Unue li devis alproprigi la Grekan lingvon, poste veturi tra la tuta Eŭropo por serĉi ĉi tiujn dokumentojn. Sur la dorso de sia azeno li migris laŭlonge de kiel eble plej multaj bibliotekoj kaj monaĥejoj por kaŝe forpreni la tekstojn.

“En siaj leteroj li dediĉas tutajn epizodojn kiel maljunaj, paŭtaj kaj speciale ankaŭ arogantaj monaĥoj senhonte mensogas al li ke ili ne havas difinitan tekston, – dum Erasmo certe scias ke tiu devas esti tie”, Pleij sonas en la aŭdioilo. Tamen li neniam rezignas sian “sanktan ĉasadon”. “Sen puraj tekstoj, por Erasmo, forfalas ĉiu bazo por religio kaj scienco”.



En 1516 eldonita Novum Instrumentum Omne

Travidebla

Post sia longa vojaĝo li finfine publikigas en Bazelo sian “Novum Instrumentum”. Ĝi estas la plej unua Biblio kiu estas ne man-skribita sed printita. Sur la paĝoj aperas maldekstre la originala Greka teksto, dekstre la Latina traduko de Erasmo. Malantaŭe en la verko estas enprenita parto kun kritikaj notoj, pri dusencaĵoj kaj diferencaj interpretacioj de la Nova Testamento. Neniam antaŭe Biblio estis skribita tiel travideble kaj science

Reformatoro Martino Lutero ricevas entuziasme la tradukon. La kritiko kiun Erasmo eldiras, konsentas kun la starpunkto de Lutero: konfesado de pekoj kaj vendado de indulgencoj ne apartenas al la kristana kredo, kiu ĝuste devus strebi al sobro.

“Lutero atendas kaŭze de tio, ke Erasmo subtenus lian batalon kontraŭ ĉi tiuj kutimoj, sed Erasmo trovas la metodon de Lutero multe tro agresiva” diras De Kleijn. “Ĝam li komparis Luteron, kiu najlis sur la preĝejon kritikajn tezojn kaj daŭre publikigis malbonajn pamfletojn, kun sovaĝa bovo. Li vidis sin mem kiel cervon, kiu kun sinregado volus reformi la unuecon de la eklezio de interne”.

Sed ankaŭ sen Erasmo Lutero povis fari sian batalon. Li uzas la Novum Instrumentum, kiun Erasmo tiel nete provizis kun fontindikoj, por sia propra Germana biblia traduko. Tiel Lutero povas redirekti la kritikon de la eklezio pri la traduko, dum li daŭrigis sian

batalon kontraŭ la katolika eklezio. “Tielmaniere la laboro de Erasmo efektive kontribuis al la Reformacio” laŭ De Kleijn. “Sed tio absolute neniam estis lia intenco”.

Eklezia skismo

Erasmo sentas naŭzon pri tiu skismo de la eklezio, kiun Lutero kaŭzas. “Vi ĉagrenis krom mi, ĉiujn netajn katolikajn homojn per via aroganta, brutala kaj agitanta karaktero per kiu vi ŝokas la tutan mondon per pereiga malakordo” estas legebla en reproduktita letero, kiun Erasmo skribas en 1526 al Lutero.

Erasmo mem ankaŭ estas objekto de kritiko. La katolikoj riproĉas lin, ke li ne pli akre kontraŭstaris Luteron; la protestantoj, ke li ne kuraĝis elekti ilian flankon. Malpravante kritikon, trovas De Kleijn. “Erasmo certe ja elektis, sed nek por la papo kaj ankaŭ nek por Lutero. Li elektis por sia propra konscienco, li faris kion li devis fari laŭ siaj propraj okuloj”. Tamen fine de sia vivo Erasmo estas seniluziigita. Lia vivoverko, kiun li dediĉis al la papo, estas uzata fare de la fondinto de la protestantismo. La eklezio estas dissplitigita, kvankam li ĝuste klopodis konservi la unuecon. Al la riproĉo, ke li metis la ovon de la herezo, kiun li ricevas des pli ofte, li reagas malĝoje: ”Mi prefere elkovus ion alian”.

☪

Principoj kaj konsiloj

Por la revizio la Biblia Societo faris detalan regularon. Unu el ĝiaj principoj estis, ke ĉiu nova traduko de la Biblio devas veni el la manoj de Britaj Kristanoj aŭ esti detale aprobata de aŭtoritata komitato de tiaj; alia, ke en ĉiuj dubaj kazoj la traduko devas sekvi la Britan reviziitan Bibliion.

Ĉiun libron esploris almenaŭ du anoj de la Komitato, kaj pri specialaj punktoj oni konsultis profesoron Mc Fadyen. Ĉio okazis tre zorge, ekzemple la unuformigo de nomoj k.s. postulis tutajn tri jarojn. La Societo rekomendis ŝanĝi la tradukon de Zamenhof nur en plej gravaj kazoj. Se iu Komitatano volis fari ŝanĝon, li devis ĝin noti sur aparta slipo kaj submeti al la konsidero de aliaj.

Jam frue oni de Zamenhof ricevis konsenton pri reviziado; li skribis:

“Ke la Biblia Societo deziras, ke oficiale responde estu la komitato, tion mi trovas tute natura. Al pastro Rust mi donas plenan rajton fari en mia traduko ĉiujn ŝanĝojn, kiujn Li trovos necesaj aŭ utilaj, sed kun la kondiĉo ke tio estu farata ne sub mia nomo.”

Akademiano Bailey persone atestas pri la granda laboro, kiun la reviziantoj faris:

“La redakta laboro estis grandega afero. Pri la ceteraj kunlaborantoj mi ne scias multon, sed pri mi mem mi povas diri sen trograndigo, ke tiu tasko okupis mian tutan liberan tempon en la daŭro de la lastaj naŭ jaroj, eĉ ĝis malzorgo pri mia profesia ekzercigo. Kaj la laboro ankoraŭ ne estas finita! Malgraŭ la ofta kaj tre atenta tra-legado de la materialo – maŝinskribaĵo kaj presprovoj – troviĝas multe da eraroj, kiujn ni devas forigi por estontaj eldonoj.”

Bailey kaj Warden respondas

Li ankaŭ respondas al kritikintoj:

“Mi devas diri, ke la specialistoj en la arto de tradukado konsentas, ke bona traduko enhavas la senton de la originalo, sed ne ĉiam ĝiajn vortojn; ke la ĉefa principo estas, ke la traduko devas fari sur la leganton kiel eble tian saman impreson, kiun la originalo faris sur la originalajn legantojn.”

Al aliaj kritikoj Warden respondis:

“Ankaŭ ne ekzistas ia bazo por la supozo, ke la traduko jam havebla por Esperantistoj ricevis ian sektan influon. Kiel ni ja scias, la Majstro tradukis la Bibliion kiel literaturan verkon; kaj la reviziado de la komitato

okazis sammaniere. La komitatoj estas el diversaj eklezioj, komence unu-du katolikaj pastroj konsentis kunlabori sed bedaŭrinde la aprobo de iliaj superuloj estis rifuzita.”

Fine solviĝis ankaŭ la afero pri la kopirajto. La Centra Librejo en Parizo, kiu – kiel jam dirite – akiris de Hachette la kopirajton siatempe, en 1921 vendis ĝin por 9.000 frankoj. (La Brita kaj Alilanda Biblia Societo ankoraŭ nun posedas la kopirajton, kaj la dokumentojn de la tradukado frato Downes konservas en sia hejmo pro la kontrolo de la tekstoj, kiun li daŭre faras. Estas lia intenco poste transsendi ilin al la Brita Esperantista Asocio por zorga konservado tie.)

La Sankta Biblio solene dediĉita

En 1926 la grandega tasko, en kiu fervore kontribuis tiom da dediĉitaj kaj lertaj Esperantistoj, estis kompletigita, kaj La Sankta Biblio en Esperanto aperis, okaze de la universala kongreso en Edinburgh. En speciala Diservo la kongreso solene kaj publike dediĉis ĝin al ĝia celo (la 1-an de aŭgusto). La solenan paroladon en la katedralo faris profesoro John Bailey el la London universitato.

Unu el la plej gravaj servoj, kiujn faris Britaj Esperantistoj, estis preta.

Sed, parolante pri la historio de nia Esperanta Biblio, ni devas ne forgesi du virinojn (mi jam menciis ilin), pri kiuj Zamenhof iam skribis: “Vian nomon la Esperantistoj kaj la amantoj de la Biblio ĉiam memoros kun granda danko.” Tio estis la Kvakeraj fratinoj Priscilla kaj



REV. J. C. RUST

Paroĥestro J. C. Rust, kiu ek de la unua horo estis aktiva por aperigi la Biblion en Esperanto.

Algerina Peckover, dank' al kies financa helpo la verko povis aperi.

Kiam Warden en 1927 skribas la raporton pri la Komitata laboro, li diras i.a.:

“La moderan prezon de la Biblio ni ŝuldas al malavara financa helpo. Dum multaj jaroj ni havis subtenon de du tre fervoraj Esperantistinoj, kies forta deziro estis la eldonado de la Biblio en Esperanto, sed kies identeco estis konata al nur kelkaj samideanoj. En la lasta tempo la demandoj estis oftaj, kaj mi estas feliĉa, jam permesite diri, ke la du sinjorinoj donacintaj la nomon (ĉirkaŭ du mil pundoj) estas la Fraŭlinoj Peckover, el Wisbech,

membroj de la Societo de Amikoj, kaj fratinoj de la mortinta Lord Peckover, kies familio estis de longe malavaraj subtenantoj de la Brita kaj Alilanda Biblia Societo. La sinjorinoj, unu el kiuj havas pli ol naŭdek jarojn, longe atendis kun pacienco la aperon de la volumo; kaj ke ilia deziro jam plenumiĝis estis granda feliĉo por la komitato kaj ĝiaj kunlaborantoj.

Kiam mi akceptis la oficon de sekretario al la komitato, mi ne povas imagi, kiom da tempo kaj da laboro estos bezonata. Eble des pli bone; sed neniu el ni domaĝas la laboron, sed kontraŭe estas fiera ĉiu partoprenanto, kiu iel helpis aperigi la tradukon de Zamenhof kiu estos lia ĉefverko, krom la kreado de la lingvo mem. Nia laboro jam finiĝis. Ni ne povas kalkuli, kiom da miloj da horoj ĝi okupis; sed kun la certeco ke multaj personoj studos la Biblion per ĉi tiu admirinda traduko de la Majstro, ni estos plene rekompencataj por la laboro.”

Sed la kritikoj ankoraŭ ne finiĝis

La kritikoj kontraŭ la reviziado ne finiĝis per la apero de la libro, kaj multaj estis la pikaj mokoĵoj pri “la Brita Biblio”, kiel oni nomis ĝin. La Britoj kun natura

amareco spertis, ke ili plej ofte devas doni la monon kaj la laborfortojn en la Movado sed poste ricevas nur mallaŭdon de la nenionfarintoj.

Sed pri ĉi tiu afero la fakto estas, ke multaj partoj estas vualitaj. Tiutempe estis certaj kaŭzoj por silenti kaj eble ankoraŭ estas. Ni diru kiel Bailey mem:

“Kaŭze de diversaj malfacilaĵoj la Esperanta Biblio estas ne tute kontentiga, malgraŭ ke grandega kvanto da fervora laboro iris al ĝia pretigado. Do la kompetentaj Esperantistoj, kiuj trovas kaŭzon por plendoj, sin dediĉu al serioza kunlaborado, montrante ĉiujn troveblajn erarojn kaj mankojn, kaj proponante eblajn plibonigojn, por kie estontaj eldonoj estu kiel eble plej bonaj.”

P.S. Interesuloj bonvolu krome legi la artikolon de frato Downes en Dia Regno 4/1959 kaj koncernajn partojn en Nia Historio, la jam fama verko de frato de Hoog.

Kroniko bazita sur mia [Karl-Olof Sandgren] prelego, ĉe Sveda konferenco en 1957. Por valora helpo mi kore dankas al Akademianoj fratoj M. C. Butler kaj W. J. Downes.



Kiu unue esprimas estimon al samrangulo aŭ homo pli malalte staranta socie, ne fariĝas per tio malpli estimata – kontraŭe – li estas pli ĝentila kaj tial ankaŭ pli estimata.

Erasmus de Roterdamo

La ofero en la Biblio

Dua parto: la Malnova Testamento

Emmanuel WALD, FR

Daŭrigo de la antaŭa numero de Dia Regno, 4/2016

Ĉu vi rimarkis, ke ĝis nun ni tute ne parolis pri la peko? Mi certas ke, se vi kutime legas la Biblion, la unua bildo kiu aperis en via menso kiam mi diris al vi ke mi parolos pri la oferoj estas la pardono de la pekoj, kaj ĉiuj reguloj kiuj estas en la Malnova Testamento: ĉu vi faris tion, oferu tion tiel; ĉu vi faris tion alian, oferu tion alian alie. Tio estas la punpago per ofero.

Tiu ideo ke ofero estas punpago partoprenas en la antaŭjuĝo kiun mi priskribis en la enkonduko: kolerema Dio serĉas la pekon de siaj fiduloj por ĝui la punon kiun ili ricevos.

Tamen en la Biblio, ne ĉiuj oferoj povas punpagi; kaj la tri kiujn mi citis (ofero de komunio, brulofero kaj planta ofero) tute *ne* estas punpagaj. Kaj ili estas la tri plej gravaj: do la hebrea ofera sistemo tute ne estas centrita sur la punpago.

Du aliaj oferoj estas tamen punpagoj. Estas la *hattat*, ofero por la peko, kaj la *aŝam*, la ofero de riparo. Tiuj du oferoj ne aperas ĉie sed nur en la Pastra Kodo, en Jeĥezkel 40-48 kaj en Kronikoj.

Ili ne ekzistis antaŭ la Ekzilo. Ilia naskiĝo estas kaŭzita per pastra teologio post la reveno Izraelen: Dio loĝas en Izraelo, Izraelo estas sankta lando. Se Dio forlasus Izraelon, la konsekvencoj povus esti gravegaj, kiel la Ekzilo mem. Do, la Izraelanoj provu ĉion por ke Dio

povu resti en Izraelo; nu Li ne povas vivi en malpura ejo. Izraelanoj do purigas sin kaj sian landon ĉiam, por certigi la ĉeeston de Dio. Tio estas gravega, kaj malfacila: la listo de tio kio povas esti malpuriga estas granda (Levidoj 11-15).

Ne kiel la “normalaj” oferoj, la *hattat* kaj la *aŝam* ne estas deciditaj de la oferantoj, sed de la pastroj, kaj iliaj formoj estas deciditaj laŭ sufiĉe precizaj reguloj kiujn oni trovas en la Biblio.

La *hattat* estas la plej grava el la du. Tiele oferu ĉiu, kiu senkonscie ne respektis malpermesaĵon (Levidoj 4:5-13), aŭ la virino kiu ĵus akuŝis (Levidoj 12), aŭ la ekslepruloj (Levidoj 14), aŭ iu kiu havas seksan malsanon (Levidoj 15), ... kaj ankaŭ dum la pastriga ceremonio aŭ la sanktigo de la altaro (Eliro 29), aŭ ankoraŭ plurfoje en la jaro ezeple dum festoj aŭ lunŝanĝiĝoj. La konscia peko tute ne povas esti pagita per la *hattat*: nur ekzilo aŭ morto povas (Nombroj 15:30-36). Kaj, kiel ni vidis, ĝi ne nur estas por homoj, sed ankaŭ por objektoj kiel la altaroj.

Nu, kio estas la *hattat* kiam ĝi ne vere, aŭ ne tute, punpagas? Ĉiukaze la *hattat* estu realigata dum tempo de ŝanĝiĝo: de malsankta al sankta (pastroj, altaroj); de sankta al malsankta (konsekritoj); de ekster la komunumo al en la komunumo (senkonscia peko aŭ

malpureco); de epoko al alia (festoj, lunoj). La *hattat* petante la intervenon de Dio en tiuj ŝanĝiĝaj momentoj, ebligas ilin. Sen la interveno de Dio, la ŝanĝiĝoj ne sukcesas.

Unu *hattat* okazis ĉiujare kaj estis aparte grava: la *hattat* de la *kippur*, la festo de la punpago. Per ĝi, la ĉefpastro purigas ne unuopulon, sed la tutan landon. Fakte, kiam unu Izraelano pekas, ĉu konscie, ĉu nekonscie, li malpurigas sin, sed li ankaŭ malpurigas la landon sanktan kaj la Templon. La *hattat* de la *kippur* purigas ilin kaj permesas la plenan ĉeeston de Dio inter Lia popolo. La malpuroj estas metitaj sur la “propeka kapro”, kiu estas sendita en dezerton, ekster la sankta lando (Levidoj 16).

Ni scias kion celas la *hattat*, sed ni ankoraŭ ne scias, kio ĝi vere estas. Malsimile al la tri aliaj oferoj, la *hattat* tute ne estas kunmanĝo. Ĝi eĉ, fakte, ne estas manĝo. La mortigo de la besto ne estas por Dio: ĝi estas por Izraelano kaj/aŭ Izraelo. Dio neniam estas la

objekto de la ofero: la *hattat* funkcias per si mem, purigante la homojn kaj la landon. La denove ebla ĉeesto de Dio estas konsekvenco de la *hattat*, ĝia celo tutcerte, sed ĝi estas nereakta.

Fakte, kio gravas estas la sango. Kiel estas skribite en Levidoj 17:11 (la Hebrea teksto estas ege malfacile tradukebla): “*Ĉar la animo de korpo estas en la sango; kaj Mi destinis al vi ĉi tion por la altaro, por pekliberigi viajn animojn, ĉar la sango pekliberigas per la animo*”.

Zamenhof decidis traduki per “animo” kion mi eble preferus traduki per “vivo”. La sango estas la vivo, kaj ĝi apartenas nur al Dio, sed Li permesas al la homoj uzi ĝin por ebligi al ili “pekliberigi iliajn vivojn”. La peko estas la morto, kaj nur la vivo povas lukti kontraŭ la morto.

Ankoraŭ, tute ne estas la mortigo kiu gravas. La mortigo estas necesa por ekhavi la sangon, sed ĝi ne havas signifon per si mem. La besto tute ne estas anstataŭanta viktimo, suferanta la morton kiun la pekanto meritis, inter alie ĉar la pekanto ne meritas la morton (ni vidis ke la *hattat* pagas nur senkonsciajn pekojn, kiuj do ne meritigas morton). Kaj ĝi ankoraŭ purigas virinojn kiuj akuŝis; la ideo ke ili meritis morton ĉar ili akuŝis estas stultega.

Ĉar *hattat* ne estas (kun)manĝo, kaj ĉar ĝi ne estas por Dio sed por la homoj, ĉu ĝi estas vera ofero? Ne plene. Fakte, la *hattat* estas ĉefe sanga rito, al kiu la pastroj donis formon de ofero por ke la popolanoj ne kredu ke estas io magia, kaj substreku la necesan intervenon de Dio.



Emmanuel Wald prelegas en Strassbourg.
Fotis Agnes Ráczkevy-Eötvös

La *aŝam* estas malpli grava. Ĝi estas konsekvenco de la kompreno, ke ĉio estas sankta en la sankta lando. Temas pri la posedo. Kiam iu ŝtelas ion, ĉu el la Templo, ĉu el ordinara Izraelano, ĝi fakte ŝtelas Dion, ĉar ĉio al li apartenas en Izraelo (Levidoj 5:15-26; 14:2-32; 19:20-22; Nombroj 6:8-12). Estas do repago al Dio per besto kiu valoras pli ol la ŝtelita aĵo. Samtempe, ĉiuj “civilaj” kondamnoj estas forigitaj.

Nek la *aŝam* nek la *hattat* estas veraj punpagoj. Ili estas pekliberigoj. Per la *hattat*, la malpurulo ne pagas al Dio por puriĝi, sed li ricevas la donon de la vivo. Per la *aŝam*, la ŝtelisto povas ripari sian krimon, kaj tiel li ne plu estas kondamninda. Ankaŭ, nek la unua nek la dua partoprenas en la kulto. Ili kreas la kondiĉojn por ke la kulto, kiu necesas la ĉeeston de Dio, okazu; kaj ili plifaciligas la sociajn interrilatojn.

Ili estas oferoj iom strangaj, tamen kiel ĉiuj oferoj ili celas la benon, sed nerekte. Permesante ke la tri aliaj oferoj okazu, ili permesas al la beno okazi.

Konkludo

Vi do vidis ke la antaŭjuĝoj pri la oferoj estas malveraj. La Dio de la Hebreoj ne estas sangosoifanta, kaj la Hebreoj ne estas masohismaj. Ofero tiel gravas, ĉar ĝi permesas al Dio interrilati kun ili. Kaj ni hodiaŭ per ĝi povas iom pli bone kompreni la bildon kiun havis la Hebreoj pri Dio.

Unue, Dio estas simila al la homoj. Li manĝas, kaj Li ŝatas bonajn odorojn. Plie kaj pli grave, li eĉ estas simila al la Hebreoj mem. Oni rekonas la fremdulojn ĉar ili ne manĝas kiel ni; Dio

manĝas kiel Hebreo.

Sed due, Dio estas samtempe la malsimilega. Dio ne manĝas ekzakte kiel la homoj: li havas specialajn partojn, kaj la Diaj kaj la homaj partoj oni ne kuiras same (fajro por Dio, akvo por homoj), kaj ne manĝas samloke (la altaro por Dio).

Ĉar Li estas simila al la homoj, Li povas kompreni nin, kaj interrilati kun ni; sed ĉar Li estas malsimilega, ni ne povas alproprigi Lin. Li ne estas ĉu unu ĉu la alia; Li ne estas iam tiel kaj iam alie; Li estas samtempe simila kaj malsimilega. Dio estas pli granda ol Dio.

Unue en la historio de la Hebreoj, oni oferis nur viandon. Du evoluoj okazis:

- la kritikoj de la profetoj faritaj al oferoj fariĝinte aŭtomatan riton (Hoŝea 6:6;14:3; I Samuel 15:22; Psalmo 50:13) estigis vojon al “spiritualigo” kaj “etikigo” de la kulto, kaj pligravigis la preĝon kaj la sindonemon;
- la naskiĝo kaj pligravigo de la plantaj oferoj estigis vojon kiu kondukis nin ĝis niaj sakramentoj, la pano kaj la vino estante jam oferataj al Dio.

La mondo ŝanĝiĝis, kaj do la formo de la kulto kiu uzadas oferojn ne plu taŭgas hodiaŭ. Sed ilia senco ne estas malsimila al la nia; oferi sangon por pekliberiĝi ne estas pli racia ol preĝi! Ni akceptu ke nia fido kaj nia kulto ne estas plene raciaj, kaj do ne moku la senraciaĵojn en aliaj religioj aŭ el aliaj tempoj, sed ĉiam serĉu kompreni.

En sekva(j) artikolo(j) legeblas pri la Nova Testamento kaj la “mem-ofero” de Jesuo Kristo.



Historia evento en Lund

“From Conflict to Communion – Together in Hope”
De konflikto al komuneco – kune en espero

Bengt Olof ÅRADSSON, SE

La 31-an de oktobro 2016 okazis historia evento en Lund. Historia ne nur por Lund kaj Svedio, sed por la tuta kristana mondo, ĉar La Katolika Eklezio kaj la Luterana Monda Federacio (LMF) kunvenis por la unua fojo. Tio okazis en Lund. Kune oni inaŭguris la reformacian jaron memorigante pri la 500 jaroj kiuj pasis post kiam Lutero, laŭdire, najlis siajn tezojn sur la preĝejan pordon en Wittenberg.

Dum la renkontiĝo, sub la temo *De konflikto al komuneco – kune en espero*, oni kune festis ekumenan preĝon inter alie kun la papo Francisko kaj la episkopo Munib Younan, prezidanto de LMF. La liturgio estis evoluigita specife por tiu ĉi okazo. Ĉar la preĝejo, la katedralo en Lund, nur permesas 550 personojn samtempe partopreni, la preĝo estis montrita ankaŭ per grandaj ekranoj diversloke. Eble, ĉar

la sveda ĉefepiskopo estas virino, ŝi ne oficis dum la preĝo.

Dum la renkontiĝo la papo kaj la episkopo ankaŭ signis dokumenton pri kunlaboro.

Esperanta traduko de tiu deklaro troviĝas je goo.gl/07mNdI.

œ



Episkopo Munib Younan



Papo Francisko

Kio estas la fono por la reformacia memoriĝo en Lund?

Luterana Monda Federacio (LMF) kaj la Katolika Eklezio subtenis dialogon dum 50 jaroj. Tiu-ĉi dialogo venigis nin al hodiaŭa situacio, kaj en tiu procezo la dokumento “El konflikto al la Komuneco” aperis 2013. En ĝi luteranoj kaj katolikoj esprimas bedaŭron kaj malgajon por la doloro kiun ili faris unu al la alia, sed ankaŭ dankon al la teologiaj komprenoj kiujn ambaŭ partioj kontribuis.

En Lund LMF estis formita en 1947. La katedralo de Lund, kie la ekumena preĝo okazis, havas 1000-jaran historion dividitan de kaj katolikoj kaj luteranoj.

La 500-jara memoriĝo de la Reformacio okazas ankaŭ aliloke; ekzemple en Wittenberg en Germanio kaj Vindhuko en Namibio.

Li perdis ĉion, li gajnis ĉion

Vilĉjo GOLDSMITH, Usono

La Brila Vizitanto

'Johano' (ne estas lia vera nomo), havis 23 jarojn kaj havis edzinon kaj filinon. Li instruis islaman teologion en sia urbo de Afganlando. Lia patro, alta estro de la Talibano, decidis ke Johano devas plenumi unu el la ĉefaj dogmoj de la islama religio: fari la haĝeon, pilgrimadon al Mekko.

Johano vojaĝis al Arabujo en novembro 2011. Lia patro sendis dek korpoĝardistojn kun li. Tiu nokto en Mekko dum li dormis, li sonĝis ke homo kun brila vizaĝo kaj brile vestita aperis al li. La homo diris al Johano, “Mi rimarkas ke vi serĉas Min, sed la vera fido ne estas ĉi tie.”

Kiam Johano kaj miloj da aliaj homoj piediris ĉirkaŭ la Kaaba ŝtono, li subite komprenis ke ili “adoras rokon”.

Johano piediris kun la aliaj pilgrimantoj al la urbego Mina kie ili tendumis. Tiu nokto, Johano denove havis vizion de la brila homo. En la vizio, Johano kuris al la homo kiu staris sur monteto. “Kiu vi estas?” Johano demandis.

La homo respondis, “Mi deziras paroli kun vi ĉar mi amas vin. Se Mi diras al vi Kiu Mi estas, vi perdos sep aĵojn. Vi perdos la Koranon kaj Mohamedon. Vi perdos viajn gepatrojn. Vi perdos la infanon kiun vi amas. Vi perdos viajn parencojn kaj ĉiuj malamos

vin. Vi perdos viajn riĉojn. Vi estos senhejma kaj oni forpelos vin el via lando.

“Se vi ne akceptos la perditajon de ĉi tiuj sep aĵoj, vi ne povos trovi Min plu. Antaŭ ol vi naskiĝis, Mi havis planojn por vi. Kiu estas via elekto?”

“Se Vi diras al mi Vian nomon,” Johano respondis, “Mi kredos je Vi.”
“Mi estas via Dio,” la homo respondis. “Mi estas Jesuo Kristo.”

En la vizio, Jesuo tuŝis la kapon de Johano, kaj li ekdormis. Kiam li vekigis, li diris ke li estas tute alia homo. “Mi estis tute purigita, kaj mi sentis min kiel bebo ĵus naskita.”

Enkarcerigita en Afganlando

Johano tuj forlasis la haĝeon kaj li flugis hejmen al Afganlando. Li telefonis al sia patro el la flughaveno en Kabulo. “Mi revenis,” li diris.

“Kial vi revenis?” lia patro demandis kolere. “Restas tri tagoj ankoraŭ de la haĝeo.”

Johano avide deziris partigi la veron, kiun li trovis, kun sia patro. Kiam li alvenis al la granda kampo kun konstruaĵoj kaj ĉirkaŭita de muroj kie loĝas la familio de lia patro kaj ankaŭ la soldatoj de la Talibano, lia patro

demandis, “Kion mi devas respondi kiam oni demandas kial vi forlasis la haĝeon?”

“Mi trovis mian Dion,” Johano respondis, “kaj mi ne kredas je via Alaho.”

“Kiun vi trovis?” lia patro demandis.

“Mi kredas je Jesuo Kristo,” Johano respondis.

“Vi estas nekredanto!” lia patro kriegis kaj li komencis bati Johanon.

“Se vi parolos al la homoj tiel, mi fortranĉos vian langon.”

“Mi deziras atesti al la homoj,” Johano diris. “Mi ne deziras halti.”

“Se vi rakontos al la homoj ke vi iĝis kristano, mi bruligos vin, vian edzinon, kaj vian infaneton!” lia patro minacis.

La patro ĵetis Johanon en karceran subteretaĝon kie la anoj de la Talibano retenis kaj torturis siajn malamikojn. Li estis retenita tie dum preskaŭ 18 monatoj, kaj li suferis daŭran torturon por premi lin malkonfesi sian fidon je Jesuo.

Nur la patro kaj du el liaj plej fidelaj anoj el la Talibano sciis kie Johano estis. Kiam la edzino de Johano demandis kie Johano estas, ŝia bopatro respondis ke li estis sendinta Johanon al Egipto por studi tie.

Johano daŭre estis batita kaj li ricevis tre malmulte da nutraĵo. Liaj karcergardistoj metis serpentojn en la subteretaĝon, sed ili aŭ mortis aŭ ili ne difektis Johanon kiam ili mordis lin. La karcergardistoj eĉ ellasis sovaĝan hundon en la subteretaĝon, sed ĝi tuj iĝis amiko de Johano. Post monatoj da torturo, la karcergardistoj klopodis

krucumi Johanon kun kapo malsupren. Malgraŭ iliaj penadoj, ili neniam sukcesis serioze difekti lin.

Dum la longaj, solaj monatoj kiujn Johano pasigis en la subteretaĝo, li ofte havis sonĝojn pri Jesuo. En la sonĝoj Jesuo ĉiam diris al Johano ke li ne devas maltrankviliĝi. Ĉiu nokto, la Sankta Spirito instruis lin. “Dio donis potencon al mi kaj diris al mi, 'Mi estas kun vi.'”

En marto en 2013, post preskaŭ 18 monatoj en la subteretaĝo, la patro de Johano ellasis lin. Kiam Johano eniris en la hejmon de la familio, malpura kun longa haro kaj barbo, la familianoj ŝokiĝis. Tiu nokto, post kiam li lavis sin, li avide aliris al sia edzino por rakonti al ŝi pri Jesuo. “Maria,” li diris, “mi deziras rakonti ion al vi.”

Ŝi interrompis lin, “Mi devas unue rakonti ion al vi.” Ŝi rakontis al Johano ke dum la tempo kiam li estis enkarcerigita en la subteretaĝo, ŝi sonĝis pri Jesuo. La Sinjoro konsolis ŝin kaj promesis ke ŝia edzo revenos hejmen. Maria iĝis kredanto je Jesuo, sed ŝi ne informis la familion. Johano rakontis al sia edzino ĉion kio okazis al li ek de la unua vizio de Jesuo en Mekko. Ili ĝoje ploris kune.

Denove en la Karcera Subteretaĝo

Malgraŭ la minaco de sia patro, Johano rakontis al sia patrino kaj al la aliaj anoj de la familio pri Jesuo. Ĉiu nokto, kiam la patro eliris, li instruis al ili tion, kion li lernis de la Sankta Spirito. La patrino, liaj fratinoj, onkloj kaj kuzinoj iĝis kredantoj je Jesuo. Multaj homoj en la urbo ankaŭ eksciis pri la nova fido de Johano.

Kelkajn monatojn poste, la edzino de Johano gravediĝis duafoje. La patro de Johano postulis ke li nomu la infanon Sajeed Muhammad. “Ne,” respondis Johano, “Mi ne deziras doni islaman nomon al mia filo. Mi nomos lin Isa [Jesuo].”

La patro tre furioziĝis kaj li batis la kapon de Johano. “Silentu, nekredanto!” li kriegis. Kaj li ĵetis Johanon denove en la karceran subteretaĝon.

La patro de Johano rakontis al la patro de Maria kio okazis. La patro de Maria estas mulao (loka islama estro) kaj ano de la Talibano. Li alfrontis Marian. “Via edzo estas nekredanto. Vi devas abortigi la infanon,” li diris.

“Ankaŭ mi kredas je Jesuo Kristo,” Maria respondis. Ŝia patro pugnofrapis ŝian buŝon, rompante ŝiajn dentojn. Li frapadis ŝin ankaŭ en la ventron. Tiam li trenis ŝin al ŝia bopatro kaj kune ili ĵetis ŝian malrigidan korpon en la karceran subteretaĝon kun Johano.

Eskapo el Afganlando

Dum Johano kaj Maria estis enkarcerigitaj en la karcerita subteretaĝo, la patro de Johano forportis ilian infanon por renkonti aliajn estrojn de la Talibano en alia urbego. Ili decidis la sorton de Johano. Tiuj estroj kulpigis la patron ĉar li (supoze) permesis Johanon konvertiĝi al kristanismo. Ili ordonis la patron ke li mortigu Johanon. La 20-an de aŭgusto 2013, la patrino de Maria eksciis pri la plano kaj ŝi telefonis al la patrino de Johano.

Lia patrino kuris al la karcerita subteretaĝo kaj rompis la pordon. Ŝi donis \$2.400 al Johano, lian komputilon, kaj valizon. “Foriru el Afganlando, mi petas,” ŝi diris al ili. “Mi zorgos vian filon.”

Kvankam ili ne deziris lasi sian filon, Johano kaj Maria sciis ke se ili tuj ne eliros, ili estos mortigataj. Ili esperis ke ilia infano estu ekster danĝero kun la patrino de Johano. Do, ili forkuris al urbo ĉe la bordo de Afganlando, kelkajn horojn for. Post tri tagoj, Johano trovis interretan kontakton. Kiam li atingis sian patrinnon, li povis vidi en la komputila ekrano sian dujaran filon sidantan sur ŝiaj genuoj, sed li ne povis vidi la kapon de sia patrino.

Lia filo kriis, “Paĉjo! Mi fartas bone. Revenu, mi petas. Mi sentas la mankon de vi.” La patrino de Johano kuraĝigis ilin ke ili revenu hejmen, dirante ke jam ne ekzistas danĝero. Johano kaj Maria tuj faris planojn por reiri. Sed la patrino de Johano telefonis kelkajn horojn poste por averti, “Ne revenu. La Talibano serĉas vin. Kiam ni parolis antaŭe, ili staris ĉi tie kun fusilo kontraŭ mia kapo. Vi devas tuj foriri.”

Rifuĝintoj el Afganlando

Tiun tagon Johano kaj Maria forkuris al alia lando en Centra Azio. Maria havis dolorojn kaj preskaŭ ne povis moviĝi. Ŝi ne estis tute resanigita de la batado kiun ŝi ricevis de sia patro kaj bopatro. Johano portis ŝin al kuracisto kiu diris ke la infaneto en la ventro de Maria estas morta, kaj ke Mario ankaŭ mortis se la

feto ne estos forigata. La kuracisto diris ke la operacio kostos \$5.000. La juna geedza paro jam elspezis tutan sian monon.

Hejme tiun vesperon, Johano ploris dum Maria dormis. Kiam li preĝis, li sentis ke Dio gvidis lin ŝmiri la edzinon per oleo kaj preĝi super ŝi. (La oleo estas simbolo de la Sankta Spirito. La ŝmirado de malsanuloj per oleo estas ordonita en la Biblio. Jakobo 5: 14, 15) Johano preĝis ke Jesuo savu la vivon de lia nenaskita filo. Tiam li ekdormis. Kiam li vekigis la sekvan tagon, li surprizigis ĉar Maria staris trinkante tason da teo. La tago antaŭe ŝi ne povis piediri.

La tagon poste, ili reiris por viziti la kuraciston. Li ekzamenis Maria-n. “La infaneto vivas!” la kuracisto diris. “Kiel eblas?” Johano rakontis ĉion al la kuracisto, kaj li rakontis ke li estis preĝinta en la nomo de Jesuo ke lia filo estu resanigita. “Ĉi tio estas miraklo,” diris la kuracisto. “Mi neniam vidis ion similan dum mia vivo.” Li kunvokis aliajn homojn en la kliniko por ke ili vidu Maria-n, kaj Johano sciigis sian rakonton ankaŭ al ili. Kelkaj homoj en la ĉambro ekkredis je Jesuo Kristo tiun tagon.

Revenu aŭ ni mortigos vian filon.

La Talibano daŭre gvatĉasis Johanon kaj Maria-n eĉ post ilia forkuro el Afganlando. Johano ricevis minacajn telefon Alvokojn de fanatikuloj el Pakistano, el Afganlando, kaj eĉ el Arabujo. Tiam la Talibano faris ultimaton: la geedza paro revenu al Afganlando kaj

ili rifuzu sian kristanan fidon aŭ ilia dujara filo estos mortigata. La limdato estis la 4-an de oktobro 2013.

Johano faris ĉion kion li povis. Li vizitis ambasadon, li alvokis homojn el la Unuiĝintaj Nacioj sed neniu deziris helpi lin. La patro de Johano liveris la infanon al la Talibano por reakiri la honoron inter siaj teroristaj kamaradoj. “Ni eksciis pri la morto de nia filo kelkajn tagojn post la 4-a de oktobro,” diris Johano. “La Talibano metis bildon de mia morta filo en sia interreta paĝo.”

La murdo de la infaneto ŝokis la patrino de Johano kaj liajn kvin fratinojn. Ili demandis kiel la islama fido povus pravigi la murdon de infaneto pro la agoj de lia patro. Ili diris al la patro de Johano ke liaj agoj por reakiri sian honoron inter la Talibananoj estis hontindaj. La patrino kaj la fratinoj de Johano tiam anoncis al la tuta urbo ke ili ankaŭ sekvas la Jesuon Kriston, kiun Johano proklamis al ili.

“Tre baldaŭ ni eksciis de mia bofrato ke mia patro mortigis mian patrino kaj miajn kvin fratinojn kaj ke li enterigis ilin.”

“Ni kredas tion, ĉar ni nek vidas nek aŭdas ion pri miaj fratinoj.”

Kvankam la fratoj de Maria estis anoj de la Talibano, ili malkonsentis kun la estraro pri la murdo de la fileto de Johano. Kaj kiam la patro de Johano kaj la Talibananoj murdis la fratinojn de Johano, la fratoj de Maria komencis pafilbatalon kun aliaj anoj de la Talibano. La korpo de la plejaĝa frato

estis trovita kelkajn tagojn poste kun unu mano fortranĉita. Sed la malplejaĝa frato povis eskapi.

Kiam la patro de Maria eksciis ke lia edzino estis malkaŝinta la planon de mortigo de la geedza paro, li murdis ŝin, donante al ŝi venenon por ratoj. Dum ĉiuj iliaj perditajoj, Johano kaj Maria nur povis plori kaj preĝi, “Dio, Vi scias.”

La geedza paro daŭre ricevis minacojn. Homoj kiuj pretendis esti policanoj frapis al la pordo, minacante resendi ilin al Afganlando. Unufoje, Johano estis arestita, sed advokatoj sukcesis akiri lian liberecon. Aliafoje, kvin aŭtoj plenaj da viroj venis al la apartamento. La homoj komencis frapadi al la pordo. Johano diris, “Mi diris al ili, ke, se ili deziras mortigi min je la nomo de Alaho, ili devas fari tion. Ili ĉiuj ektimis kaj foriris.”

Mi deziras labori por Dio

Novembro 2013, Johano kaj Maria estis baptitaj. Februaro en 2014, Isa naskiĝis, tute sana. Pro daŭraj minacoj de la Talibano, la familio devis transloĝiĝi sesfoje dum ok monatoj. Johano daŭre parolis pri Jesuo al ĉiuj, ofte al komercistoj kiuj laboris en la bazaroj. Johano komencis utiligi la interreton por atesti al afganlandanoj ĉirkaŭ la mondo, inkluzive al siaj antaŭaj studentoj en Afganlando. Multaj homoj konvertiĝis al Kristo per la potenca atesto de Johano.

En la lasta parto de 2014, Johano, Maria, kaj Isa estis akceptitaj kiel rifuĝintoj en okcidenta lando. “Mi deziras labori por Dio,” li diris. “Mi deziras montri al la homoj el Afganlando

kiel kredi je Jesuo. Mi ne deziras ke homoj vidu min, sed ili vidu Dion. Mi perdis ĉion, tial mi deziras rakonti al la homoj pri Jesuo, kiu diris, '*Ĉe la domo de mia Patro estas multaj loĝejoj.*' (Evangelio laŭ Sankta Johano 14: 2) Li bezonas multajn homojn por plenigi ilin.”

* * * * *

Kiel Jesuo profetis al Johano, li perdis la sep aĝojn. Li perdis la Koranon kaj Muhammad-n. Li perdis siajn gepatrojn. Li perdis sian dujaran infanon. Li perdis siajn parencojn kaj multaj malamamis lin. Li perdis siajn riĉaĝojn. Li estis senhejma kaj oni forpelis lin el lia lando.

Jesuo diris: “*Kaj ĉiu, kiu forlasis domojn aŭ fratojn aŭ fratinojn aŭ patron aŭ patrinon aŭ infanojn aŭ kampojn pro mia nomo, ricevos multoble kaj Heredos Eternan Vivon.*” (Evangelio laŭ Sankta Mateo 19: 29)

Pripensu: Johano kaj Maria perdis amatajn parencojn. Sed post la releviĝo ili renkontos denove siajn patrinon kaj fratinojn kiuj konvertiĝis al Jesuo Kristo. Ili ankaŭ renkontos sian murditan filon. Ilia filo, kiu mortis en la ventro de Maria revivis post , Johano preĝis por li en la nomo de Jesuo. Ili gajnis la Biblion, la veran Vorton de Dio. Ili gajnis eniron en la Regnon de Dio. Ili gajnis la eternan vivon.

Li gajnis Jesuon Kriston.

Li gajnis ĉion.

☪

Jubileo kaj fino

Franz-Georg RÖSSLER, DE

Oktobre de 2016 renkontiĝis en la Domo Kardinalo Wendel en la sarlanda urbo Homburgo ĉirkaŭ tridek personoj por ĉeesti la solenan festadon de la jubileo *Dudekkvin jaroj katolika Esperanto-asocio en la diocezo Speyer*. Tiu suborganizaĵo de la tegmenta IKUE celebris en la Afrikapelo de la katedralo de Speyer regule po kvar Diservoj jare. Krome ĝi en la regiono, en Germanio kaj en tuta Eŭropo kontribuis multe al la Esperanta vivo. La plej impona videbla rezulto estas la preskaŭ 1500-paĝa kanto- kaj preĝolibro ADORU. Nun ĝi atingis sian 25-jariĝon kaj festis ĝin kadre de Kultura semajnfino de la Sarlanda Esperanto-Ligo.

Post bankedo sacerdote Kronenberger, la spirita gvidanto, celebris dank-

Maldekstre la incipito, la komenco, de la memoriga bildprezentado.

Dekstre la fina estraro:

Anton Kiefer, Rita Rössler-Buckel, Albrecht Kronenberger.



meson. Poste la prezidantino Rita Rössler-Buckel festprelegis antaŭ bildprezenta kontribuo pri la plej gravaj eventoj. Kontribuis al la solena etoso la koruso *Kanti por Eŭropo*. Fine disdoniĝis riĉe ilustrita dokumenta kajero por daŭra memorigo.

Antaŭ la solenaĵo okazis membrokunveno, en kiu oni unuanime decidis fini la asocian agadon de tiu ĉi eklezie kaj ŝtate agnoskita societo pro ŝanĝiĝo de la internaj kaj eksteraj cirkonstancoj. Kun aflikto, tamen kun danko kaj bonaj memoroj pri la kuna agado dum tiom longa tempo, la membroj disiris konscie, ke ja la organizaĵo ĉesis, sed ke ne ĉesos la unueco, nek la laboro, nek la espero.

☪



Abundajn salutojn

Abundajn salutojn kaj benojn je la nomo de la Sinjoro la kreinto de la ĉielo kaj la tero, ni post unu jaro de ekzisto, malfermiĝas al la publiko por eventuala kunlaboro.

La Ligo de esperantistaj Biblio-legantoj estas sendependa organizo kiu kunigas kristanojn el diversaj kristanaj doktrinoj cele al komuna lernado de la sankta Biblio.

Esperanto estas nia laborlingvo, kaj ni opinias ke la legado de la Biblio estas ege avantaĝa por la homo, ĝi ebligas kleriĝon, spiritan kaj mensan disvolviĝon. Plie la legado de la sankta Biblio riĉigas kaj plialtigas la lingvoscion.

Malgraŭ nia eta nombro, ni paŝon post paŝo evoluas por firmigi la ligon

praktikante la solidarecon laŭpove kunlabori por sincera fratiĝo inter la membroj.

Unu el niaj fratinoj nome s-ino Umba Diwa Josephine instruas Esperanton kaj la dian vorton al junaĝaj infanoj per ludoj, kantoj, rakontaĵoj k.t.p. Tial ni turnas nin per tiu ĉi mesaĝo aŭ komunikado al ĉiu bonkorulo sendi, se eblas, uzitajn sed bonstatajn ludilojn kaj aliajn infanajn lernomaterialojn por faciligi la taskon de nia fratino Umba Diwa Josephine.

Ni ĉi tie dankas la estraron de KELI pro la sendo al nia ligo de tri ekzempleroj de la sankta Biblio. Tiu materialo estas nia ĉefa havaĵo.

Kontaktu nin al jenaj adresoj:
arlainmayinda@gmail.com
sagessediwa@gmail.com

LIGO DE ESPERANTISTAJ BIBLIO LEGANTOJ
Prezidanto Arlain Kizeyidioko Mayinda
Bp 1007 Limete, Kinshasa
Rep Dem Du Congo, Tel +243811692451

Noto de la redaktoro:

En Dia Regno numero 2/2012, Arlain Kizeyidioko Mayinda skribis artikolon nomita “Kristanaj sektoj multnaskiĝas en Kongo”.

Germana sekcio de KELI invitas Vin kore partopreni
KRISTANAN KONGRESON
(67-an kongreson de KELI)
7. – 14. aŭgusto 2017, Z Ö B L I T Z, Germanio

A L I Ĝ I L O

Familia nomo: Persona nomo:


Adreso: Lando:

Telefono: Retadreso:

Mi mendas ĉambron: unu-litan du-litan tri - litan kvar - litan

Mi preferas loĝi kun:

Dato:

 Plenigu la dorsan flankon kaj fortranĉu ! subskribo

Sendu al: Pavel POLNICKÝ, Lidická 939/11, CZ-290 01 Poděbrady, Ĉeĥio,
Tel: +420 723 672 335 E-mail: polnickypavel@seznam.cz

La kongreson organizas KELI, sed partopreni povas ankaŭ IKUE-anoj kaj ĉiuj aliaj esperantistoj, kiuj volas ĝui kristanan medion en belega naturo. **Zöblitz** estas ĉarma montara urbeto 40 km de Chemnitz kaj estas atingebla trajne, buse kaj aŭtomobile (parkejo ĉe la kongresejo). La kongresejo estos: Bibel und Freizeitheim Hüttstattmühle, 4 km de la urbeto. Je nia dispono estos 1 – 4 litaj ĉambroj, kelkaj kun necesejo kaj duŝo.

Sumoj estas ◇ **La aliĝo validas nur post la pago de garantia sumo** ◇ **Restadkosto en EUROj**

	ĝis 31.12.2016	ĝis 31.3.2017	ĝis lasta aliĝo 15.6.2017	
Kategorio A :	20	30	40	190
Kategorio B :	40	50	60	310 (360)*
Kategorio A:	eksocialismaj landoj, Afriko, Sudameriko			* unulita ĉambro
Kategorio B:	ĉiuj aliaj landoj			

- Sendoj de monbiletoj (EUR) per registrita letero al Pavel Polnický.
- Esperanto-Liga für Christen, Ev. Bank Kassel. **IBAN DE20 5206 0410 0006 4349 16**
BIC GENODEF1EK1
- UEA-konto de Rudolf Fischer: **rfis-w**

Organizaj informoj:

Mi estas vegetarano: JES / NE

Mi postulas (specialajn dezirojn) :

.....

Mi estas preta gvidi ĉiutagajn preĝojn : JES / NE

Mi povus prelegi pri :

.....

Mi alveturos : trajne / buse / aŭtomobile

kiam (proksimume):.....

Notoj de LKK:

El provizora programo:

- oficiala malfermo de la kongreso
- interkona vespero
- diservo kun sankta manĝo
- ekskurso al Dresdeno
- prelegoj, kantado
- kontribuo de partoprenantoj
- koncertoj
- jarkunveno de KELI
- ...

Zöblitz kaj kongresejo Hüttstattmühle bon- venigas vin al kongreso en la reformacia jaro 2017 !



Dum 2017 ni festos la 500an datrevenon de la reformacio. Wittenberg estas la centra loko de tiu datreveno, sed nia kongreso okazos aliloke en Germanio, en Zöblitz pro praktikaj kialoj.

Ni jam 2012 aranĝis sukcesan kongreson en Zöblitz en la sama kongresejo, kiu plu evoluigis dum la pasintaj jaroj, ekzemple nun troviĝas ankaŭ liberaera banejo.

Vi estas ĉiuj kore bonvenaj.

Se vi legas germane, vi trovas pli da informo sur la paĝo <http://www.huemue.de/>

≧ *Gratulojn al Leen Hordijk pro lia 90-jariĝo* ≦



Foto el Dia Regno 4/2006 fare de Els van Dijk

Atingis la redakcion la informo ke nia antaŭa kasisto Leen Hordijk la 22-an de oktobro festis sian 90-jariĝon. Kun sia edzino Sietske li partoprenis multajn kongresojn.

Gratulojn!

Vi, Dia Kreinto

(originale verkita en Esperanto)

M: THERE IS A FOUNTAIN • ES IST EIN BORN

1. Vi, Di - a Kre - in - to,
Vi, Pa - tro, Pa - trin',
nin - te - nas, nin - be - nas,
a - me-gas nin sen fin', sen fin'.

2. Vi, Dia Ŝafido,
buĉita por ni,
|: *senpekigas, liberigas,*
repacigas nin kun Di'. :|
3. Vi, Dia Spirito,
ŝtormego kaj flam',
|: purigas, bruligas,
plenigas nin per am'. :|
4. Al Vi, Triunuo,
nun estu ador'.
|: *Vi nin gvidos, ĝis ni vidos*
Vin en Via Dia glor'. :|

VI, DIA KREINTO • THERE IS A FOUNTAIN • ES IST EIN BORN • NAK 49 •
M: anonima • angla T: William Cowper (1731-1800) • germana T: versio de Her-
mann Ober (1926-2006) • E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2016-10-16